

Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 5-an de aprilo
Ĝenerala asembleo
- Lu, la 3-an de majo
Gramatikaĵoj
- Sa, la 19-an de junio
Ekskurso
- Lu, la 6-an de septembro
Decidota

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : eventaservo.org/o/LES

Lunde, la 1-an de marto 2021 je la 20-a ĉe Knud kaj Marie-Antoinette Sunier en Montreux Cléa Robin malkovrigos al ni « La Dancon de la Energio »

SEKRETA TEKSTO

Rekonstruu tekston de Zamenhof anstataŭigante ĉiun numeron per litero.

Solvo en la alia flanko.

1 i - 2 o 3 4 5 ia 4 , - 2 e - 6 iu - 7 a 3 8 o - a 9 a 10 11 e 3 a 4 - 3 e - a 7 - 11 iu - aŭ - a 7 ia - 12 e 3 11 o , - 4 e 8 - 9 7 e 3 e - e 12 a 7 10 aj 11 e - a 7 - 6 iuj - 4 iaj - 7 o 13 a 3 11 oj , - 2 ia 3 - aj 3 - 4 u 9 o 14 a 11 a 3 - 8 e 15 e 3 o 3 , - 7 i 3 12 15 o 3 , - 10 e 7 i 12 io 3 - aŭ - 4 o 5 ia 3 - 10 o 7 o 3 - i 7 i - 16 a 15 a 4 ; - 7 a - i 8 e 3 11 i 12 a 8 o 3 - 8 e - 7 a - i 3 11 e 10 e 4 oj - 8 e - u 3 u - 7 a 3 8 o -

2 u 3 - 7 a - i 3 11 e 10 e 4 - 8 e - 9 u 12 3 o - 2 aj - 12 7 a 15 o .
oj - 8 e - 11 iu - aŭ - a 7 ia - 12 e 3 11 o - aŭ - 10 e 7 i 12 io - 2 aj - 7 a - 9 10 e 11 e 2 4 11 a 8 o 3 - 8 e - iaj - 16 i 4 11 o 10 iaj - 10 aj 11 oj , - 2 iuj - 9 e 10 1 e 4 a 4 - a 7 - u 3 u - 12 e 3 11 o - e 3 - 7 a - 7 a 3 8 o - 10 e 12 i - 4 u 9 e 10 - 7 a - a 7 iaj - 12 e 3 11 oj - 2 aj - 17 o 10 10 i 17 u 14 i - a 7 - i 7 i - 7 a - 9 7 ej - e 7 e 1 e 3 11 a 3 - 2 aj - 3 a 11 u 10 a 3 - 10 aj 11 o 3 - je - 7 a - 9 a 11 10 ujo , - 1 i - 10 i 12 a 10 8 a 4 - 2 ie 7 - 10 e 4 11 aĵo 3 - e 7 - 7 a - 11 e 1 9 oj - 18 a 10 18 a 10 aj , - 2 ia 1 - e 2 14 i 4 11 i 4 - 3 u 10 - 10 aj 11 o



Ch. Haxion, Troyes.

Doktoro Zamenhof, la Kreinto de l'Esperanto' kaj lia Edzino

Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com ...esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2020

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>



esperanto-france.org
/le-monde-de-l-esperanto

Eldonaĵo de ILEI



Aperas 4-foje jare,
per poste (18€) aŭ rete (11€).

LA FANTOMOJ DE LA LAGO versio A, parto 3



***** 0101010101010101 *****



Fine de la 19-a jarcento fondiĝis la nacia Biblioteko svisa. Samepoke naskiĝis esperanto, humanisma lingvo kaj artefarita, kiu ankaŭ posedis siajn pionirojn en Svislando.



Foto pri la membra grupo de la Svisa Esperanto-Societo dum la kongreso de 1909 en Soleure

SEKRETA TEKSTO

Mi konscias, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj, kian ajn supozatan devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas; la identigadon de la intereso de unu lando kun la intereso de tiu aŭ alia gento aŭ religio kaj la pretekstadon de iaj historiaj rajtoj, kiuj permesas al unu gento en la lando regi super la aliaj gentoj kaj forrifuzi al ili la plej elementan kaj naturan rajton je la patrujo, mi rigardas kiel restaĵon el la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

Mario daŭrigas: «*Jen tiu papero. Tiu letero estis sendita de la notario de Stefano, samkluba amiko, kun kiu mi ofte parolis pri strangaj fenomenoj; li tial multe ŝatis vojaĝi enmonde. Antaŭ tri monatoj Stefano memmortige malaperis en Kebekia rivero.*» Liza klarigas: «*Stefano havis nenion kialon sinmortigi.*» Mi legas la surpaperan adreson, tiun de la kabano de maristoj «*La Olda Ŝipo*», kiu situas en Buchillon. Sur la papero aperas ankaŭ kodo el ses ciferoj kaj literoj.

bruligis kadavrojn de ratoj. La eklezio kondamnis ilin esti ŝtiparumitaj meze de la «Chamblard»-arbareto. La legendo diras, ke nun la triopo revenas surstrande timigi la vilaĝanojn per bruoj hororaj. Depost kelkaj jaroj la maristoj organizas kradrostaĵojn por nombraj mistikuloj, kiuj esperas ekvidi la «fantominojn».

Liza tuj proponas telefoni por rezervi vesperon en tiu marista kabano. Mario hezitas: «*Ĉu vi ne timas? Ĉu vi pensas, ke ne danĝeras?*» Lia edzino respondas: «*Se Stefano donis tiun adreson por vi, mi pensas, ke li deziris, ke vi iru al ĝi, ĉu ne?*» rigardante min. Mi nenion diras, krom: «*La telefonnumero facile troveblas ... do simplas ... ĉu jes aŭ ne? ... voku ilin.*»

Mi decidas proponi pli profundiĝi perrete kaj enketi pri «La Olda Ŝipo». Ni malkovras, ke antaŭ kelkaj jarcentoj la vilaĝo «Buchillon» nomiĝis «Chanivaz». Tiuepoke la centoj de loĝantoj metiis kiel kamparanoj, fiŝistoj kaj vitokultivistoj. La historiista teksto rakontas, ke iam tri fratinoj estis arestitaj kiel sorĉistinoj. Oni diras, ke kutime en lunplenaj noktoj borde de la lago la virinoj dancante ĉirkaŭ fajro kaj kantante en fremda lingvo

ne estas akceptataj ... tri ... do bone ... ĉu vi havas kodon?» Mario, surprizita, legas: «*J4X2E6*». Kvinfoje la voĉo ripetas: «*Do bone ... do bone*» kaj elŝaltas la komunikon.

Kiam ni alvenas proksime de la lago, belega sunsubiro ruĝiĝante bonvenigas nin. Apud la marista kabano silente ĉeestas geviroj tre strange vestitaj, iliaj brakoj levitaj, rigardante la ĉielon. Alproksimiĝas malgranda maristo kun okulbendo. Li salutas nin malvarme. Mi rekonas la raŭkan voĉon. La pirato kondukas nin al rezervita bareltablo. Apud ni ĉeestas paro, la virino preĝas kaj la viro aspektas iomete nervoza. Tiu najbaro tenas enmane kuniklan piedon, certe kiel bonŝancaĵon. La nokto alvenas kaj unu el la maristoj alportas unu kandelon sur ĉiun tablon, glasojn kaj botelon da blanka vino regiona. Tiumomente la laŭtparolilo anoncas: «*Kio ajn okazos, ne moviĝu, restu trankvile sidantaj je via tablo.*»

Intervjuo de Giulio GRIGOLETTO, fidela membro de LES

(Fare de Francisko)



- *Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfaze.*
Apud la lago «Orta», apud Svislando, en tanista vilaĝo itala mi naskiĝis en 1935. Mi metilernadis kiel ŝuisto. Poste mi grimpis la hotelan skalon ĝis esti ĉefkelnero. Kiam mi 19jaraĝis mi venis labori en Montreux-Palaco. Mi edziĝis en 1956 kaj patras du filojn. Mi eksedziĝis, iris al Britio kaj revenante laboris en La Grappe d'Or.
 - *Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

Mi kelkfoje ekvidis budon pri esperanto en La Palud sen vere atenti, tamen iam mi proponis al Monique alproksimiĝi por malkovri tiun «novan» lingvon.
 - *Kiam vi decidis studi esperanton?*

Esperanto, latina lingvo kiel la itala, tuj interesis min. Surloke, Francisko proponis partopreni la senpagan kurson ... ni tuj aliĝis.
 - *Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

Unu el miaj filoj loĝas en Aŭstralio kaj la alia en Laŭzano. ili «pensas» nenion
 - *Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

Ni plezure amikiĝis kun la esperantistoj en Laŭzano kaj ŝatas tiun etoson.
 - *Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

En 2012, kun Monique, mi partoprenis la Italan Kongreson. Tamen, persone, mi ne plezuras fore vojaĝi kaj preferas partopreni la aktivajojn en nia regiono.